

Ĉi-numere en la bulteno de ...

# Esperanto-USA

Dumonata bulteno / Bimonthly bulletin • Vol 44, N° 1 (2008/1)



*Krome: tradukdefio, diversaj raportoj, kaj eĉ pli!*

# Esperanto-USA

Dumonata bulteno / Bi-monthly bulletin

Sendu kontribuojn al / Send submissions to:

✉ E-USA bulteno, RC Box 271205  
Rochester, NY 14627-1205  
United States of America  
✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktotino por la venonta numero:  
Editorial deadline for the upcoming issue:  
**10 Mar. 2008**

☆☆☆

Ni bonvenigas kontribuojn al la bulteno kaj en Esperanto kaj en la angla. Sendante artikolojn, nepre inkluzivu vian plenan nomon, foton de via vizaĝo, kaj vian retpoŝtadreson. Sendante fotojn, informu nin pri la nomo de la fotinto, kaj ankaŭ pri la nomo(j) de fotito(j), loko, kaj dato, se eble.

Sendante materialojn poŝte, inkluzivu vian plenan nomon, telefonnumeron kaj poŝtadreson. Bonvolu noti, ke ni *ne* resendos materialojn, krom se vi inkluzivos mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la publikigita materialo.

Opinioj esprimataj en ĉi tiu bulteno apartenas al la aŭtoro(j), kaj ne nepre prezentas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redakcio.

☆☆☆

We welcome contributions to the newsletter in both English and Esperanto. With articles please include your full name, a photo, and your email address. With photos please include the full name of the photographer, and if possible the names of the subjects, location, and date.

When sending contributions by mail, be sure to include your full name, phone number and return address. Please note that materials will *not* be returned unless you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this bulletin if you give due credit and send us a copy of the reprinted material.

Opinions expressed in this bulletin are those of the author(s) and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

☆☆☆

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

## Novjarajn salutojn!

Bonvenon al nova jaro kaj nova numero de nia bulteno! Kiel vi sendube jam rimarkis, la nova jaro alportas kelkajn novaĵojn por la bulteno: novan aperoritmon, iom novan aspekton, kaj eĉ novan redaktoron! Mi nomiĝas Hoss FIROOZANIA, kaj mi esperantistiĝis en 1991. Korajn salutojn al tiuj, kiuj jam konas min; pri la aliaj: mi ĝuas renkonti vin!

Mi elkore dankas al Joel kaj Ĵenja AMIS pro ilia mirinda laboro dum jaroj; cetere mi forte esperas, ke ili plu kontribuos al la bulteno kiam aliaj devoj permesos.

Pretiĝante transpreni la postenon de redaktoro, mi tralegadis praaĵn numerojn de la bulteno... malantaŭen ĝis mia naskiĝjaro kaj pli fruen. La sperto estis vere humiliga. Kiom da historio! Kiom da miaj herooj en la usona movado redaktis tiun ĉi bultenon mem! Fariĝi la plej nova ero en tiu "ĉen' senintermita" estas donaco honora—kaj ankaŭ iomete teruriga! Mi provos fari mian plejblon por fierigi vin pri nia bulteno kaj daŭre restigi ĝin vigla kaj interesa.

Bonvolu memori, ke la bulteno ekzistas ĉefe por kunligi vin kaj por informi pri enlandaj sciindaĵoj; ĝi estas informilo **via** kaj ĝi nepre bezonas **vian** kontribuojn: artikolojn, fotojn, anoncojn, recenzojn, leterojn ktp. Mi petas vin resti en kontakto kaj sciigu min pri tio, kio okazas en via regiono.

Mi esperas, ke vi ĝuos ĉi tiun unuan numeron de 2008! Kompreneble, viaj proponoj kaj kritikoj estas ĉiam bonvenaj.

Agrablan legadon!

Welcome to a new year and a new issue of the newsletter! As you've undoubtedly noticed, the new year brings some changes for the newsletter: a new schedule, a somewhat new layout, and even a new editor! My name is Hoss FIROOZANIA, and I've been speaking Esperanto since 1991. Warm greetings to those who know me already; as for everyone else, it's nice to meet you!

I owe much thanks to Joel and Ĵenja AMIS for their wonderful work over the years; I very much hope they will continue to contribute to the newsletter when other obligations permit.

In preparing for the job of editor I've been reading through issues from long ago—from as far back as my birth year and beyond. The experience has been truly humbling. So much history! So many of my heroes in the American Esperanto community edited this very newsletter! To become the latest link in that "unbroken chain" is an honor—and also a bit terrifying! I'll do my best to make you proud of our newsletter and keep it lively and interesting.

Please remember that the newsletter exists primarily as a link between you, the members, and to keep you abreast of interesting news from around the USA; it is **your** publication and it necessarily depends on **you** for submissions: articles, photos, announcements, reviews, letters, etc. Please keep in touch and let me know what's happening in your area.

I hope you enjoy this first issue of 2008. Your suggestions and criticisms are of course always welcome.

Pleasant reading!



### Esperanto-USA (formerly the Esperanto League for North America)

#### Centra Oficejo/Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA  
☎ 510.653.0998; 2510.653.1468  
✉ info@esperanto-usa.org

**Director/Direktoro, CO**  
William B. HARRIS

**Prezidanto/President:** Philip G. DORCAS  
**Vicprezidanto/Vice President:** Steven D. BREWER  
**Sekretario/Secretary:** Julie SPICKLER  
**Kasisto/Treasurer:** Anna BENNETT  
**Aliaj estraranoj/Other board members:**  
Joel AMIS, Ĵenja AMIS, Trevor ANDREWS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, Lusi HARMON, Robert L. READ, Tim WESTOVER, Christopher ZERVIC

EL LA CENTRA OFICEJO | DE VILĈJO HARRIS


# Esperanto-USA vendas varojn eksterlande

La celo de Esperanto-USA estas disvastigi la lernadon kaj uzon de Esperanto en Usono. Kompreneble, la E-USA libroservo vendas la plejparton de la varoj al usonanoj. Tamen, Esperantistoj en aliaj landoj kelkfoje aĉetas ekzemplerojn de libroj, kiujn ni eldonis.

Eksterlandaj anglalingvanoj volas aĉeti la librojn “Comprehensive English-Esperanto Dictionary” kaj “Being Colloquial in Esperanto”. Pro tio, La Esperanto-Asocio de Britio de tempo al tempo aĉetas ĉi tiujn librojn kvinope aŭ dekope por revendi ilin podetale. Individuoj en Kanado, Britio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando ankaŭ aĉetas ekzemplerojn ĉe ni.

En 2005, Esperanto-USA eldonis la libron “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko”. Tiu libro, tute en Esperanto, interesas Esperantistojn ĉirkaŭ la mondo, kaj kelkaj Esperantaj libroservoj, inkluzive de la UEA Libroservo, aĉetis ekzemplerojn por revendi ilin.

Eksterlandanoj en multaj landoj ankaŭ deziras aĉeti “Pasporto al la Tuta Mondo”, kiu haveblas per nia libroservo.



## VILĈJO HARRIS

estas Direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA en Emeryville, CA.

Kontaktu lin, ĉe:

**elna@esperanto-usa.org**

Komence de majo, 2007, la usona poŝtinstanco oficialigis novan tarifon de sendo-kostoj, kaj enlande kaj eksterlande. Pro tio, la kosto sendi varojn eksterlande duobliĝis. Ekzemplo: La kosto de ekzemplero de PMEG estas USD 27.00. La sendokosto por sendi ĝin al Brazilo estas USD 26.70! Rezulte, kelkaj libroservoj en aliaj landoj, inkluzive de la UEA Libroservo, rezignis pri aĉetado de niaj libroj pogrando. Tamen individuoj en diversaj landoj ankoraŭ aĉetas librojn ĉe ni.

La laboranto en la libroservo bezonas pli da tempo plenumi la mendon de eksterlandano ol plenumi enlandan mendon por kelkaj kialoj. Unue, la sendokosto po funto varias de lando al lando,

do oni povas kalkuli la sendokoston nur post kiam la pakaĵo estas preta sendi. Due, dogan-formularo estas kutime devigita. Trie, oni devas liveri la pakaĵon al la poŝt-oficejo permane. Kvare, la poŝtinstancoj en kelkaj landoj ne estas fidindaj—pro tio, oni devas asekuri la pakaĵon kontraŭ perdo aŭ sendi ĝin rekomendite (*angle: by registered mail*) por certigi, ke ĝi ja alvenos.

Dum la lastaj ok jaroj, la Esperanto-USA libroservo vendis librojn al aĉetantoj en dekoj da landoj kie la Esperantomovado ankoraŭ estas malforta. Pro tio, ni povas fiere diri, ke nia libroservo ludas gravan rolon en la disvastigo de Esperanto tra Usono kaj ankaŭ tra la mondo. ★

## Final call for candidates

The work of the Nominating Committee is now finished. We searched through a long list of possible candidates, and chose from them 11 names. Of those, four declined to be candidates, leaving the seven you will see on the printed ballot which will be mailed from the central office sometime after February 15.

However, members of E-USA should be aware that Article 403 of the By-Laws of ELNA states: “Any five or more members of the League may make a written nomination of any candidate, sending such request to the Chairman of the Nominating Committee before February 15. The Nominating Committee shall include such candidate in the list, provided the candidate has accepted the nomination.”

I will accept such nominations up to **midnight EST on February 15**. They must be signed by five current members of the League and mailed early enough to arrive by February 15. Obviously e-mailed nominations cannot be accepted due to the requirement for signature.

William R. HARMON  
Chairman, Nominating Committee

## Translokiĝo de la centra oficejo progresas...



V. HARRIS

Malgraŭ la translokiĝa ĥaoso en Emeryville ĝuste nun, Vilĉjo afable trovis tempon verki raporton por ni — kaj eĉ sendi fotojn! Jen la ekstero de la nova oficejo. Vilĉjo raportas, ke la interno ankoraŭ plenplenas je malnovaj, forigendaj meblaroj. Ni atendas plian informon venontnumere. Dankon kaj bonŝancon, Vilĉjo! —Red.



# Teaching a one-lesson microcourse



## D. GARY GRADY

is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgary@mindspring.com](mailto:dgary@mindspring.com)

At meetings of clubs, civic groups, and churches, at science fiction conventions, in fact any time organizers have a need for talks and presentations to entertain and inform their members, you have an opportunity to introduce Esperanto.

A common approach is to give a talk about Esperanto—what it is, why to learn it, and so on—but an interesting alternative is to dive right into teaching the language. Dennis Keefe's article in the latest issue of *Internacia Pedagogia Revuo*\* makes some useful suggestions for doing this.

In designing a one-session micro-course it's important to take into account the varying interest levels of your audience and the fact that they haven't (yet) signed up for Lesson Two. Ideally, the lesson should be as fun and entertaining as possible, bearing in mind the likely diversity of participants. It helps to cover a number of topics: a little about pronunciation, a little about grammar, a few useful phrases, etc.

Keefe suggests beginning by speaking in Esperanto for a minute or two simply to let the audience hear it. You can then switch to English (or the appropriate local language), asking if they recognized any of the words, and spend a small amount of time, perhaps three to five minutes, talking about what Esperanto is, giving a little of its

history, current use, similarities to English, and so on.

You can now start teaching them to speak Esperanto. Keefe suggests breaking up the lesson into three to five topics, each four to six minutes long. The details depend on the teacher, but here's a possible outline:

- Start by teaching a few useful phrases.
- Talk a little about the alphabet and pronunciation.
- Review the phrases already taught and introduce a few new ones.
- Explain the grammar and word-formation used in the phrases covered so far.
- Give them some more practice speaking.

Don't try to rush through too much or cover anything completely. (You don't even need to present the whole alphabet.) But before you finish, you might want to point out how much the students have learned already.

If possible, show some brief video segments of Esperanto in use, for example at *Universaliaj Kongresoj* and *Internaciaj Junularaj Kongresoj*. There are a number of short videos on YouTube that could be useful. Show them Esperanto magazines, books, and CDs, and let them listen to a few brief clips of music.

At the end allow 5-10 minutes for questions and finally explain how they can continue learning if they want to, whether in a local course or group, on the Internet, or at NASK.

This approach lets you cover a lot of ground in well under an hour while obeying the old performer's maxim of always leaving them wanting more.

These one-lesson micro-courses have been used in a series of successful "language festivals" held in Europe over the past ten years or so set up to offer brief introductory lessons in as many as a few dozen languages.

For more about language festivals, see the web site:

<http://www.linguafest.info>

\* *Internacia Pedagogia Revuo* is the publication of *Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj* and one of the two quarterly periodicals received by members of the American Association of Teachers of Esperanto. For more information, search for "AATE" at [esperanto-usa.org](http://esperanto-usa.org).

*A correction: The AAIE membership dues were given incorrectly in the last issue. The amount is \$40 per year including receipt of both publications by mail or \$30 for electronic distribution. My apologies for the error. ★*

## Onklo Zam diras:



**MI VOLAS VIN  
POR ESPERANTO-USA**

## 39-a Nord-Amerika Somera Kursaro

Belega vetero, bongusta manĝaĵo, apuda maro kaj komforta loĝejo — ĉio ĉi plus tri semajnoj en Esperantujo. Tio estis la allogo por lernantoj kiuj studis por perfektigi sian Esperanton ĉe la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD) pasintan julion.

Nun ni pretigas la programon por 2008. Tri instruistoj venos por gvidi tri kursnivelojn: Bertilo WENNERGREN (Svedio) la altnivelan, Birke DOCKHORN (Germanio) la progresigan, kaj Lee MILLER (Usono) la postbazan.

La datoj, 30 junio ĝis 18 julio, permesas studenton plibonigi sian Esperanton antaŭ ol iri al la UK en Roterdamo. Hoss FIROOZNA, studento en 2007 revenos kiel la redaktoro de la studenta tagĵurnalo *La NASKa Fasko* kaj organizanto de eksterklasaj eventoj kaj programoj.

Kurskotizo estos \$1230 por 5 studunuoj. Loĝado en unupersona ĉambro kun tri manĝoj tage estos \$1260. Oni povas ricevi rabaton por frua registriĝo kaj stipendioj haveblas, aparte por instruistoj kaj plentempaj studentoj.

**Baznivela kurso:** Tiu ĉi kurso celas lernantojn kiuj jam komencis studi Esperanton, atinginte la nivelon de “alta komencanto.” La kurskunvenoj emfazos bazan konversacian scipopon, konon de la baza lingvostrukturo kaj vortprovizo, kaj uzadon de Esperanto en kutimaj interhomaj renkontiĝoj. Enfokusigās la kapablo paroli kaj la kapablo kompreni parolon. Cetere, lernantoj studos la historion kaj kulturon de Esperanto. Instruado okazos ĉefe en Esperanto, kun klarigoj en aliaj lingvoj, laŭbezone.

**Meznivela kurso:** Tiu ĉi kurso celas progresantojn kiuj jam finstudis enkondukan kurson de Esperanto. Ĝi emfazos konversacian paroladon kaj vortprovi-



NASK isn't just for classroom study. It's also a place where students can use Esperanto to have fun and make new friends from around the world. Pictured after class at NASK 2007, left-to-right: Brandon SOWERS, Emilija GJURCINOVSKA, Hector ORTEGA.

### Pliaj detaloj / More info:

Ellen EDDY <eddyellen@aol.com>

<http://esperanto.org/nask>

zon, kaj pritraktos certajn gramatikerojn pli detale, laŭ la bezono kaj deziroj de la partoprenantoj. Krome la kurso akcentos la uzadon de Esperanto en interkulturaj renkontiĝoj, kaj la lernantoj studos ankaŭ la kulturon de Esperantujo, precipe kantojn. Instruado okazos ĉefe en Esperanto.

**Altnivela kurso:** La centra temo de la altnivela kurso estos “Aliaj landoj, aliaj kulturoj.” La partoprenantoj interalie elserĉos informojn pri diversaj landoj (precipe ne tre bone konataj), kaj prezentos prelegojn k.s. unu al la aliaj. Okazos ankaŭ kvizoj (kreataj de la partoprenantoj mem) kaj diversaj ludoj. Krome ni kompreneble traktos la fajnajn punktojn de la Esperanta gramatiko uzante PMEG-on.

## 39<sup>th</sup> North American Summer Esperanto Institute (NASK)

Beautiful weather, tasty food, a nearby ocean and comfy lodgings — all this plus three weeks immersed in Esperantujo. That was the attraction for students working to perfect their Esperanto skills at the University of California, San Diego (UCSD) last July.

Plans for 2008 are underway. The dates, June 30th - July 18th, accommodate students who wish to improve their Esperanto before heading to the World Congress in Rotterdam.

We've invited three instructors this year: Bertilo WENNERGREN (Sweden) will teach the advanced course, Birke DOCKHORN (Germany) will teach the intermediate, and Lee MILLER (USA) will lead the basic course. Hoss FIROOZNA, a student in 2007 will return as the editor of the student newsletter *La NASKa Fasko* and organizer of extracurricular events and programs.

Tuition is \$1230 for 5 credits. Lodging costs \$1260 for a single room and three meals per day. There are discounts for early registration and scholarships are available, especially for teachers and full-time students.

### Description of the basic course:

Designed for students who have already started the study of Esperanto and are at the “high beginner” level, the focus will be on the ability to speak and to understand spoken language. Participants will also study the language's history and culture. Classes will be conducted mainly in Esperanto, with explanations in other languages as needed. ★



## Lokaj festoj dum Esperanto-Tago 2007

Multaj el vi kunvenis, babiladis, manĝis, ludis muzikon, deklamis poezion, kaj alimaniere festis la datrevenon. (Tamen neniu ebrie dancis surtable—aŭ, almenaŭ tian feston neniu konfesis!) Koran dankon al Dave RUTAN, Joan PHILIPS, David DOUGHERTY, Viktor PAJUK kaj Lee LEWIS pro la afablaj raportoj kaj fotoj!

1. La E-societo de Ĉikago aranĝis bankedon kun riĉa kultura programo. Interalie gitarludis Bajron EGUIGUREN (vidu la unuan paĝon) kaj flutludis s-ino Tina SEASTROM (fotis Sepideh LAAL)
2. La Esperanto-Societo de Vaŝingtono festis ĉe Kapitolo-Monteto en la usona ĉefurbo. (de maldekstre) Ralph DUMAIN, Emil VOLCHECK, Paul O'SULLIVAN, Jeb BOLLING kaj Jim RYAN. (fotis D. DOUGHERTY)
3. Ĉe la ĉikaga kunveno: (de maldekstre) Viktor PAJUK, Karlo GUNN, Tina SEASTROM, Gertrude NOVAK, akompaninto kaj Byron EGUIGUREN, Karlo OFFUTT, Roberto STALZER, Elena MATEEVA-TERJUNG (fotis S. LAAL)
4. La Esperanto-Asocio de Minnesota kunvenis en St. Paul. (de maldekstre) Guomei LI, Joan PHILIPS, Daniel HUSTON, Susan ALEXANDER, Vince SENSKI, Lucia & Arturo JOHNSON, Anya WHITE, Leslie (patrino de Anya), Raymond WISE. (fotis J. PHILIPS)
5. En Princeton, Nov-Jerzejo, kunvenis (de maldekstre) Todd MOODY, Wayne ROSSI, Peter SCHWEINSBERG, Dave RUTAN kaj Alan FINEBERG. (fotis Regina FINEBERG)
6. Ĉe kunveno de la Esperanto Association of St. Louis ĉeestis (de maldekstre) Audrey GLOSSOP, Pat & Duncan CHARTERS, Peggy DOLTER, Ron GLOSSOP, Dave FALLERT, Isabel DOLTER, Lee LEWIS, Jeff WILSON, Mary & Jerry JOHNSON. (fotis L. LEWIS)
7. Alan FINEBERG kunportis belan kukon, ĉu ne? (fotis R. FINEBERG)




**TAKE  
7**
**Sepa Tut-Amerika Kongreso de Esperanto**
*Septième Congrès d'espéranto des Amériques*
*Seventh Esperanto Congress of the Americas*
*Séptimo congreso de esperanto de las Américas*
*Sétimo congresso de esperanto das Américas*
**Montrealo 2008**

## 56<sup>a</sup> landa kongreso de Esperanto-USA – 11-14<sup>a</sup> julio, 2008

### Aliĝilo / donacilo

Antaŭnomo : ..... Familia nomo : .....

Akompanantoj : .....

Kompleta adreso : .....

Lando : ..... Poŝta kodo: .....

Telefono : (.....)..... alia : (.....).....

Reta adreso : .....

Kotizoj: Ebligas partopreni E-USA kongreson kaj TAKE-7 dum aŭ kvar aŭ ok tagoj.  
 E-USA kongreso okazos de la 11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio 2008.  
 Inkluzivas la fakan programon de ambaŭ kongresoj kaj la kulturajn eventojn.  
 Ne inkluzivas la bankedon, antaŭ- kaj postkongresajn ekskursojn, manĝojn kaj tranoktadojn.

- 75 \$ CAD/USD : kvartaga (11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio) ĝis la 15<sup>a</sup> de marto 2008  
 90 \$ CAD/USD : kvartaga (11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio) ĝis la 31<sup>a</sup> de majo 2008  
 110 \$ CAD/USD : kvartaga (11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio) ekde la 1<sup>a</sup> de junio 2008 kaj surloke  
  
 100 \$ CAD/USD : semajna (11<sup>a</sup> - 18<sup>a</sup> de julio) ĝis la 15<sup>a</sup> de marto 2008  
 120 \$ CAD/USD : semajna (11<sup>a</sup> - 18<sup>a</sup> de julio) ĝis la 31<sup>a</sup> de majo 2008  
 140 \$ CAD/USD : semajna (11<sup>a</sup> - 18<sup>a</sup> de julio) ekde la 1<sup>a</sup> de junio 2008 kaj surloke

Mi volas partopreni la bankedon kiu inkluzivas spektaklon kaj dancon : 30\$ CAD/USD per persono

 Kiom da personoj : .....  Vegetarano  Alergioj : .....

Mi donacas por helpi esperantistojn nepagipovajn partopreni TAKE-7.

 .....\$ CAD/USD - kvitanco havebla por Kanadanoj, kruco   
*Donaco je la nomo de Esperanto-Societo Kebekia*

Mi interesiĝas pri

- retaj novaĵoj pri TAKE-7  
 kontribuo al la faka aŭ kultura programo (klarigu sube, kion vi deziras prezenti por kiom da minutoj – kaj kian ekipaĵon vi bezonos.)

Komentoj/petoj : .....

.....

.....

Vidu dorse

**Société québécoise d'espéranto • Esperanto-Societo Kebekia**

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal, Québec, Canada • H2G 2R8 • www.take7.ca • informo@take7.ca

Mi mendas tranoktadon (la prezoj inkluzivas impostojn kaj administrajn kostojn) :

- 110\$ CAD/USD : « Studio Suite » en UQAM. Privata loĝejo; ĉambro kun duobla lito, kuirejeto, salono, banejo kaj duŝo, klimatizilo, televido, litotukoj, bantukoj; ne inkluzivas manĝilaron, kuirilojn. Ideala por paro kun infano. Estas nur 4 haveblaj, mendu rapide.
- 80\$ CAD/USD : « Studio » en UQAM. Privata ĉambro kun duobla lito, kuirejeto, banejo kun duŝo, litotukoj, bantukoj; ne inkluzivas manĝilaron, kuirilojn. Ideala ebleco por paro.
- 55\$ CAD/USD : « Multi-8 » en UQAM. Privata ĉambro kun unuopa lito, litotukoj, bantukoj; 8 personoj dividas komunajn kuirejon, salonon, kaj 3 banejojn kun duŝo; ne inkluzivas manĝilaron, kuirilojn. Belega vido al la urbo-centro. Ideale por persono kiu volas amikiĝi kun aliaj tamen havante privatan ĉambron. Prezo por persono
- ĉe esperantistoj (nur por nepagipovuloj)
- mi mem zorgos

Cirklumu la mendatajn datojn : Julio 6 - 10 - 11 - 12 - 13 - 14 - 15 - 16 - 17 - 18 - 19 - 20 - 21

Sume por tranoktado: ..... \$ CAD/USD kosto ponokte X .....kiom da noktoj = ..... \$CAD/USD

*Eblas mem mendi tranoktadon en hotelo « Lord Berri » : 120 \$ CAD/USD + impostoj / unuope aŭ duope kaj 10\$ CAD/USD por kroma persono. Indiku « Esperanto-Kongreso »; notu ke ili ne parolas esperanton. Voku senpage : 1.888.363.0363 au mendu rete: info@lordberri.com www.lordberri.com*

## Aliĝilo al la antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Ni rekomendas al vi sendi vian aliĝilon al la ekskursoj samtempe kun via aliĝilo al TAKE-7. Tamen eblas aparte aliĝi al la ekskursoj sed la limdato estas la 31<sup>a</sup> de majo 2008. La ekskursaj kotizoj ne estas repageblaj sed ili estas transdoneblaj al alia persono. *Notu : La prezoj ne inkluzivas la manĝojn kaj la tranoktadojn en Montrealo en jaŭdo (2008-07-10) kaj vendredo (2008-07-11). Vi devas mendi la tranoktadon aparte.*

Mi/ni aliĝas al la 4-taga, 3-nokta antaŭkongreso al Kebeko/Wendake indianejo/Naturejo (7-10 julio)

- 250\$ CAD/USD (provizora prezo) : Tranoktado en kvarlita ĉambro, necesejo komuna
- 325\$ CAD/USD (provizora prezo) : Tranoktado en dupersona ĉambro, necesejo privata
- 430\$ CAD/USD (provizora prezo) : Tranoktado en unupersona ĉambro, necesejo privata

Dum la ekskurso, mi preferas viziti muzeojn, indianejojn, naturejon.

Mi/ni aliĝas al la 2-taga, 1-nokta postkongresa ekskurso al Kebeko aŭ al Otavo. (19/20 julio). Ĝi ekveturos matene la 19<sup>an</sup> kaj revenos vespere la 20<sup>an</sup>. Se vi flugos la 20<sup>an</sup>, nepre mendu nur noktan flugon.

- 135\$ CAD/USD : Tranoktado en kvarlita ĉambro, necesejo komuna
- 145\$ CAD/USD : Tranoktado en dupersona ĉambro, necesejo privata
- 190\$ CAD/USD : Tranoktado en unupersona ĉambro, necesejo privata

La kostoj validis en Januaro 2008. Tamen, ni ne povas garantii al vi la finan koston ĉar kosto de benzino, nova imposto, ktp povus influi la finkalkulojn.

Mi pagas per  ĉeko (CAD aŭ USD) je la nomo de Esperanto-Societo Kebekia  
 kreditkarto (uzu Paypal, vizitu nian retejon : [www.take7.ca](http://www.take7.ca) kaj alk laku : kiel aliĝi ?)

Totalo pagata : .....\$ CAD/USD Dato:.....Subskribo :.....

TAKE-7 estas organizata kunlabore kun la Amerika Komisiono de UEA kaj la Kanada Esperanto-Asocio.

**Société québécoise d'espéranto • Esperanto-Societo Kebekia**

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal, Québec, Canada • H2G 2R8 • [www.take7.ca](http://www.take7.ca) • [informo@take7.ca](mailto:informo@take7.ca)



VOJAĜE | DE LUSI HARMON

# Vojaĝu Esperante en 2008!



## Nord-Amerika Somera Kursaro 20 junio – 18 julio

NASK okazos tuj antaŭ la UK ĉe University of California, San Diego—vidu anoncon ĉi-numere!

## Esperanto-USA Landa Kongreso 11 – 14 julio Montrealo, Kanado

Okazos dum la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE)—11-18 julio samloke kun ebleco partopreni ambaŭ. Vidu aliĝilon ĉi-numere!

TAKE estas kongreso kiu okazas proksimume ĉiun 3-an jaron por Esperantaj loĝantoj en Ameriko. La 7-a TAKE okazos por la unua fojo norde de Meksik-urbo. La kongresa temo estas: **Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diversseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj.** Pli da detaloj, fotoj kaj klarigoj troveblaj ĉe hejmpaĝo: <http://www.TAKE7.ca>

## 93-a Universala Kongreso en Rotterdamo, Nederlando 19 – 26 julio La 100-jara jubileo de la fondiĝo de Universala Esperanto Asocio



Lastatempe Rotterdamo fariĝis ne nur tre sukcesa komerca havenurbo, sed ankaŭ arkitekture avangarda kaj kulturoplena. La Uniĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2008 *Internacia Jaro de Lingvoj*. Tiu deklaro inspiris la elekton de la kongresa temo: “Lingvoj: trezoro de la homaro.”

Rotterdamo estas sufiĉe multekosta urbo—speciale ĉar la valoro de la Usona dolaro tiel multe falis kontraŭ la valoro de la Euro. Lastatempe unu \$US valoras nur 0.68 Euroj. La UK-programo certe estos bunta pro la jubileo de UEA—kaj la eblaj ekskursoj ankaŭ interesaj—speciale multaj kelkhoraj aŭ unu tagaj krozoj sur la rivero Maas tra la plej granda, moderna haveno en Eŭropo ĝis la “Delta Works” kaj al la spektaklaj ventumiloj de Kinderdijk. Rotterdamo estas konata kiel “Verda Urbo,” ne nur pro la fakto ke ĝi estas la sidejo de la Esperanto-movado. Esperanto Vojaĝ-Servo aranĝos rektajn flugojn al Amsterdamo kaj trajn-konekton en Amsterdamo al Rotterdamo por tiuj irontaj al la UK. Helpo en viaj aranĝoj haveblas de Esperanto Vojaĝ-Servo.

**Esperanto Vojaĝ-Servo**  
1824 Euclid Avenue  
Berkeley CA 94709  
Tel.: 510-531-8393  
Fax.: 510-531-0152  
<LusiHarmon@AOL.com>

## Landa “Krozo” ĉirkaŭ Maastricht 26 julio – 2 aŭgusto



Ni uzu flekseblan difinon de “krozo” por nia ekskurso—tamen, ni kunvenos kaj dormos en malnova sed vera ŝipo. Ĝi, tamen, estas ligita al ĉefa promenejo de Maastricht kaj tute ne moviĝas. Ĝia nomo estas Botelo, sed ni renomos ĝin Boat-elo ĉar ni konas la diferencon inter botelo kaj boato, ĉu ne? Ĝi estas malnova ŝipo kiu antaŭe aktive krozis en la rivero Maas (aŭ Meuse). La ĉambroj estas kompaktaĵoj (legu malgrandaj), sed puraj, kun necesejoj kaj duŝoj ene, kaj komfortaj pro la situo EN la akvo EN la mezo de la urbo. Premita inter la Belga kaj Germana landlimoj, Maastricht estas unu el la plej vizitindaj urboj en Eŭropo. Kun longa historio ekde antaŭ la alveno de la Romianoj, ĝi nun estas malgranda sed kosmopoleca urbo kun gajanimeco nerivalata aliloke en Nederlando. Multe de Nederlando havas samecan aspekton, sed tie ĉi estas Hispanaj kaj Romiaj ruinaĵoj, diversaj specoj de manĝaĵoj, Franca kaj Belga influoj en la arkitekturo, kaj eĉ malsameca pejzaĝo. Ĝi estas tute promenebla urbo, plejparte glata sed kun kelkaj  
(daŭrigo malsupre de p. 10)

# Ĉe la redaktista skribotablo

Salutojn, karaj amikoj. Ni proponas novan rubrikon por *Esperanto-USA* per kiu vi povos ekzerci viajn talentojn kaj kapablojn rilate al tradukado de tekstoj el la angla en Esperanton.

Tradukado estas lingva arto, kaj tradukisto ofte faras zorgajn kaj malfacilajn elektojn. Ĉiu elektas malsimile, kaj per komparado kaj diskuto ĉiu povas lerni kaj profiti de malsamaj aliroj.

Tradukado estas malfacila sed fruktodona ekzerco. Tradukante tekston, vi alfrontos defiojn, esprimojn, kaj vortojn, kiujn vi alie evitus (eĉ senpense). Eĉ se vi ne estas literaturamanto, ni bonvenigas vian partoprenon. Lingvokapablo pliboniĝas nur per streĉo kaj ekzercado.

Ni ne prezentas nin kiel spertajn tradukistojn. Tamen ni ambaŭ estas lingve kompetentaj, kaj ni komentos kaj respondos el tia vidpunkto. Tim multe verkis en Esperanto (originale), kaj plurfoje premiigis en la Belartaj Konkursoj de UEA. Lee estas konata kiel instruisto ĉe NASK, kaj antaŭ kelkaj jaroj redaktis similan rubrikon por la bulteno de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso. Ni ambaŭ bone konas la literaturon de Esperanto, kaj originalan kaj tradukan. Ni ne diros "Ho, jen, tiu ĉi teksto estas perfekta traduko!" Ni pli-malpli simple volas kunordigi grupon de homoj kiuj kune esploras la arton traduki, malkovros diversajn alirojn al la tasko, kaj progresos en la lerta uzado de Esperanto.

Ni rekomendas al ĉiuj la libron *Traduku!* de William AULD (dua eldono, Esperanto-Asocio de Britujo, 2004), en kiu vi trovos diversajn modelojn kaj komentojn kiuj estas ege helpaj kaj interesaj. Ni esperas ĝis iu grado sekvi la paŝojn de s-ro AULD. Neniu povus egali lin, sed lia ekzemplo povas certe

inspiri nin, kaj dume doni al ni multe da ĝuo kaj amuzo.

Jen do la unua teksto por via laboro:

"I knew a woman that was so dexterous with a fellow, who indeed deserved no better usage, that while he was busy with her another way, conveyed his purse with twenty guineas in it out of his fobpocket, where he had put it for fear of her, and put another purse with gilded counters in it into the room of it. After he had done he says to her, 'Now han't you picked my pocket?' She jested with him, and told him she supposed he had not much to lose; he put his hand to his fob, and with his fingers felt that his purse was there, which fully satisfied him, and so she brought off his money. And this was a trade with her; she kept a sham gold watch and a purse of counters in her pocket to be ready on all such occasions, and I doubt not practised it with success."

el *Moll Flanders*  
Daniel DEFOE, 1722

Ek al la laboro! Ni anhele atendos viajn majstro-verkojn! ★



LEE MILLER

TIM WESTOVER

Ni prezentos en ĉiu dua numero de la bulteno (t.e., en numeroj 1, 3, kaj 5) mallongan tekston por via laboro. Sendu vian tradukon rete al la jenaj adresoj samtempe:

**timwestover@yahoo.com**

**lamiller@centurytel.net**

Leginte viajn tradukojn, ni faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj.

Ni petas, ke vi sendu **nur unu tradukon**, ne plurajn diversajn provojn. Traduku, kaj sendu al ni rezulton kiu laŭ vi estas via plej bona provo.

**La limdato por ricevo de via traduko estas la 10-a de marto.**

## Vojaĝu Esperante en 2008!

(daŭrigata de p. 9)

proksimaj "tuberoj" kiujn ili nomas montetoj, kie fascinaj kavernoj entenas antikvan kaj modernan historion inkluzive la ampleksajn tunelojn uzataj por ŝirmado tra la jarcentoj, kaj por savi la artaĵojn de la lando de la Germana invado dum la Dua Mondmilito.

Almete al turismado en la historio de Maastricht, spertante iujn el la internaciaj kuirartoj, vizitante iujn el ĝiaj preĝejoj, partoprenante en aŭ eskapante la matenan bazaron merkrede aŭ vendrede, ni havos plentagan krozon en vera ŝipo la tutan distancon al Lieĝo en Belgio. Je alia

tago, ni ĝuos plentagan "buskrozon" tra kvin landoj: Belgio, Francio, Germanio, Luksemburgo kaj la suda mallarĝa parto de Nederlando. Ni estos gastigataj en ĉi tiu vojaĝo de Hans ADRIAANSE, nia speciala Maastricht-a amiko. Ni havos unu liberan tagon je la fino por reiri al iu speciala loko aŭ elekti aktivecon kiun ni ne facile povas fari grupe. Vi ne povos ne ĝui ĉi tiun regionon!

Aliĝilo kaj tagaj detaloj kaj prezoj estos haveblaj antaŭ ol vi legas ĉi tiun vojaĝo-artikolon. Nepre tuj informu al Esperanto Vojaĝ-Servo se vi interesiĝas, kaj ni tuj sendos aliĝilojn. ★


# Krucvorta konkurso: solvu kaj (eble) premiigu!

Ĉi-monate ni aperigas novan enigmo-rubrikon! Vian solvon sendu al la redakcio nepre antaŭ la limdato; ĉiunumere ni elektos loterie unu sukcesinton por ricevi \$10 da rabato ĉe la libroservo aŭ retbutiko de E-USA. Rajtas partopreni ĉiuj ricevantoj de la paperforma bulteno. Solvojn sendu aŭ poŝte aŭ rete. (Por la redakcia kontakt-adreso, vidu p. 2.)

This month we're rolling out a new puzzle feature! Be sure to send your solution to the editor before the deadline; in each issue of the newsletter we'll pick a correct solution at random and award the submitter with a \$10 discount from the E-USA book service or web store. All recipients of the printed bulletin are eligible to participate. Submissions may be sent by post or email (see pg. 2 for address).

**Limdato / Deadline:**

**10 marto!**



## Horizontale

- 1 Urĝas, akcelas
- 6 lu de idonaska sekso
- 8 "Komenci per flat' kaj fini per \_\_\_."
- 10 Droge dormiga, eble kontraŭleĝa
- 13 Agas sur ion tiel, ke ĝia grandeco malpliiĝas
- 18 Ĉiujara kunveno, lastatempe en *Silver Bay NY*: mll.

- 19 "\_\_\_ kaj ĵaluzo estas gefratoj."
- 20 Kun #16 vertikale, loko de la unua Universala Kongreso

## Vertikale

- 1 Disfalinta konstruaj' aŭ urb'
- 2 "Ne sufiĉas \_\_\_' al kreditor'."
- 3 "Eĉ kaprino plaĉas, se la \_\_\_ sufiĉas."
- 4 Ĵurnalistino \_\_\_ Kosiarska de Pola Radio
- 5 "\_\_\_ stomako ne lernas volonte."
- 7 Ofta tem' en fotoj de Ansel Adams
- 9 Aplaŭd' kaj aprob'
- 11 Aŭstraliano kaj iama UEA-prezidanto \_\_\_ Enderby
- 12 Montrata loko
- 13 Substanc' uzata por hejti (kaj, fare de Avo Frosto, puni)
- 14 "\_\_\_ ĉiu ligno oni faras violonon."
- 15 *La Hobito*, aŭ *Tien kaj* \_\_\_
- 16 Vidu #20 horizontale
- 17 Senhelpe, izole, unike, ununure

## Seeking graphic designers and/or writers

Esperanto-USA currently has a budget to purchase media advertisements promoting Esperanto. Several previous attempts have met with mixed success. Next we would like to purchase an advertisement in *Language* (magazine, a publication for language instruction professionals. For a discussion of how we might like our ad to look, see: <http://www.esperanto-usa.org/en/node/987>

We are currently looking to hire someone who can design an attractive advertisement. You should be at least semi-skilled in graphic design, writing ad copy, and/or producing printable files in PDF format. Esperanto-USA will pay \$200 for this service if satisfactorily performed.

For more information, please contact Robert L. READ at <read@robertlread.net>.

## Volas korespondi

50-jara finno, invalido kaj sola fraŭlo. Intereso: muziko kaj muzikkulturoj de diversaj landoj, ĉiuspeca kolekto (ekz. bildkartoj, bultenoj, skoltmaterialo, filatelo ktp), lernado de fremdaj lingvoj (aparte la angla, germana, hispana kaj itala), numismatiko, skolta movado, sporto. Serĉas korespondamikojn tutmonde, prefere 39-48 jaraĝaj, kiuj havas similajn interesojn. Aparte interesiĝas korespondi kun lingvoinstruistoj, skoltestroj, kaj tiuj, kiuj havas familiojn.

<tapani.lappalainen@kolumbus.fi>

Tapani LAPPALAINEN  
Hauralantie 48  
FIN-37500 Lempäälä  
Finnlando, Eŭropo



Esperanto-USA  
PO Box 1129  
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org  
US POSTAGE  
**PAID**  
Leesburg FL  
Permit #1040

## New from the Book Service

### EL LA "VERDA BIBLIO"

**IZRAEL LEJZEROWICZ**

"1. En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapükon. 2. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi. 3. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo; kaj fariĝis Esperanto." Irreverent, humorous, quasi-Biblical history of the early period of Esperanto. Also includes "Babilado kun Horaĉo Serĉer". 2007. 88p. 180x120. Paper. Poland. ISBN 978-83-920289-4-9. **ELL009 \$9.30**

### FRAŬLINO MAITREYI

**MIRCEA ELIADE**

Trans. by Ionel ONET. Story of a European youth who during a stay in India falls in love with a Bengalese woman. But deep differences drive the story thread to tragedy. Series Oriento-Okcidento #43. 2007. 203p. 210x140. Paper. The Netherlands. **FRA005 \$23.90**

### ALIA VENECIO

**PREDRAG MATVEJEVIC**

Trans. by Tomasz CHMIELIK. An overview of the crossroads of East and West. Many classical illustrations and maps. 2007. 144p. 190x125. Paper. Poland. ISBN 83-920289-2-9 **ALI006 \$24.70**

### TOLDI

**JÁNOS ARANY**

Trans. by Márton FEJES. Epic poem from Hungary, originally written in 1847 and inspired by the legendary Miklós TOLDI, who in the 14th century served the Hungarian king. Illustrations by Károly MÜHLBECK. 2007. 84p. 215x140. Paper. United States. ISBN 978-1-59569-073-9. **TOL001 \$11.00**

### BLANKO SUR NIGRO

**RUBÉN GALLEGRO**

Trans. by Kalle KNIVILÄ. Autobiographical novel about a handicapped Spanish boy raised in the Soviet Union until its collapse, who then moved to Spain and finally to the United States. Winner of the Russian Booker Prize for 2003. 2007. 127p. 215x140. Paper. United States. ISBN 978-1-59569-072-2. **BLA003 \$12.00**

All books listed can be ordered: by mail from ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; by telephone at (510) 653-0998; by fax from (510) 653-1468; or through our website at [www.esperanto-usa.org](http://www.esperanto-usa.org).

For phone, fax or website orders, be sure to include a credit-card number. For some

titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website.

If a title is out of stock at the time of ordering, you will be back-ordered and later charged when the title is shipped. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar versus other currencies, all prices are subject to change without notice.

### Hazarda Esperanto



Ŝildo super la strato "Scio" en Roĉestro (Rochester), Novjorkio. La plejparto de la publiko ne aparte rimarkas ĝin, sed ial Esperantistoj sentas sin pli saĝaj tie...